

& Preĝo de la kuracisto:

< Ripete 21 el 53 batoj por strofo, entute 477 paŝoj dum 6 minutoj. Poemon verkis Geraldo Mattos (1960? en Nica Literatura Revuo n-ro 4/6, paĝoj 231-232). Baladigis kaj komponis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:53> (

a;La /mimi mimi fi mimi rere dore mi do;La mimi mimi fi mimi rere dore mi i;Mi dodo dodo re dodo TiTi LaTi do La;Mi dodo dodo re dodo TiTi doTi La

(#Rekantaĵe: mifa somi remi do TiSo La a;So dodo Sodo re dore mimi do mifa so; mifa somi remi do TiSo La)

)×9)+

(#Strofoj:

'1 Ho /Dio de la vivo kaj Dio de la morto, ; rigardu la turmenton de mia profesi' ; kaj turnu la orelon al la humila vorto ; de homo suferanta ĉe homa agoni'!

(×: **Nekredeble taŭgas korpo por viv' ; kaj venos novaj tagoj, naskiĝos nova naiv' ; nekredeble taŭgas korpo por viv'.**)

'2 Por fronti la batalon de lumo kaj de ombro ; al ĉiuj lokoj mi iras, palaco kaj kaban' ; sed kiel mi sukcesos, se ies tagonombro ; finiĝos pro decido de via pova man'?

'3 Sur korpo frostiĝanta de ia paciento ; de vivo kaj de morto fariĝas la batal' ; armilon en la mano, obstinaj en silento, ; mi luktas por la vivo, vi luktas por fatal'... ..

'4 El scio kaj praktiko dum jaroj akiritaj ; mi uzas kaj manovras la manon sur tranĉil' ; mi tranĉas, mi kripligas per strekoj senhezitaj, ; se nur mi povas porti la vivon al stabil'

'5 Se mia mano venkas la oston de la tombo ; post harda kaj peniga milito por la viv' ; mi vidas retiriĝi al sia katakombo ; la morton funebrigas en spita ofensiv'.

'6 Se tamen el la korpo la tuta vivo fuĝas ; kaj lasas min klopodi sur la kadavro nur, ; sovaĝa mortigisto rimorse mi min juĝas, ; ĉar mian bisturion makulas sangospur'.

'7 Mi petas heziteme la pagon por la servo: ; la mono min turmentus, se homo mortis for; se ree fluis sango kaj reviviĝis nervo, ; pri mono ĝenus vorto en tia ĝoja hor'!

'8 Dum mia tuta vivo, milfoje post recepto, ; la samajn rekompencojn mi havas por la task' ; al mia vango ĵetas la homoj sen escepto ; rideton post sukceso, insulton post fiask'... ..

'9 Ho Dio de la vivo kaj Dio de la morto, ; rigardu la turmenton de mia profesi' ; kaj volu min provizi per saĝo kaj per forto, ; ke beno por aliaj fariĝu mia sci'!